

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 18an de aŭgusto 1960 en kafejo Avion je la 20a horo. Ĉeestis s-anoj: Jos. Vondroušek, Jos. Friedrich, Marta Lorková, Tomáš Borkovec, prof. Vil. Scheiber, Václav Duroň, Jiří Kořínek. Estis pritraktita la nova programo de la klubkunvenoj por la 3-a jartriono 1960. La programo prezentita de s-ano Vondroušek estis akceptita kun negrandaj modifoj. Estis pritraktita la transloĝiĝo de nia klubo de hotelo Slovan la Parko de Kulturo kaj Ripozo, Rooseveltova 13. Ni ekkunvenados tie de post la 1a de septembro per inaŭgura kunveno. Oni diskutis pri la aŭtunaj E-kursoj kaj venis proponoj anticipigi al la Kursmalfermo diskutvesperon por la neesperantista publiko. S-ano Kořínek proponas afiŝi la kursojn ree 3 semajnojn, nome jam de la 11a de sept. ke la afiŝoj estus en stratoj dum la Foiro de Brno. S-anino Lorková proponas, ke la junularo kunvenu marde de post la 19a horo en la sama klubejo en Rooseveltova strato, kion oni trovas dezirinda.

La opinioj pri ĉi tiuj aferoj estis unuecaj.

Finite je la 22a horo.

Enskribis Jiří Kořínek